



Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 1998
Numero 31 (vol. 6, n° 1)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 31 (volumo 6, numero 1), Januaro-Februaro 1998

Redaktoro: Donald Broadribb
59b Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio
Telefono: (08)96 46 1389
e-poŝto: Don <enkidu@perth.dialix.oz.au>

Libroservo:

Tom Elliott, PO Box 230,
Matrville NSW 2036, Aŭstralio.
e-poŝto: <tmelt@ozemail.com.au>

Korespondaj kursoj:

D. Lukes & H. Green, PO Box 1814,
Toowoomba Qld 4350.

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS—nur 3.5") aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Ne-tajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezzone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

La rendezuo (R. Gates).....	3
La homara suferado (M. Leereveld).....	7
Instruista angulo (J. Bishop/D. Charters).....	8
Postraporto el Nov-Zelando (H. Gravatt).....	10
Deziras korespondi.....	14
Lingva angulo (A. Towsey).....	15
El Provincetown Massachusetts (S. Zaft).....	18
Respondoj por nia spurkonkurso.	18
La estonteco de Esperanto en Viktorio (F. Toubale).....	19
Odlo Bokserp antaŭ la tribunalo.	20
Prilingvaj debatoj (M. Leereveld)	22
El la regionoj.....	23
Esperantaj mallongigoj.....	25
Lastatempaj kuriozaj informoj pri Esperanto.....	26

Recenzoj:

<i>Bahaismo kaj Esperanto</i>	11
<i>Ekstremoj</i>	12
<i>Trigamba Joĉjo</i>	13

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la marta numero: 14 februaro.

ESK estas legebla per la Internet:
<http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/5541/esk.htm>

LA RENDEVUO

de RON GATES



“Kio diable?” La krion Rikardo el-lasis, kiam la aŭto, malakceliĝinte, fine kun tremeto haltis. Li metis la rapidumilon en la nekuplitan pozicion, tiris la manbremsan levilon kaj malŝaltis la sparkadon. Ĵetinte rigardon al la instrumentopanelo, “La benzino,” li diris. “Ĝi estas elĉerpita.”

De la malantaŭa benko demandis lia edzino: “Ĉu vi ne daŭre kontrolis la gaŭĝon?¹ Kial vi lasis ĝin tiom malaltiĝi? Vi povus plenigi la rezervujon kiam ni trapasis Novakampon.” La tono estis riproĉplena.

Rozmaria, sidante apud Rikardo, ekrigardis lin kun kompato sed diris nenion.

Li kuntiris la brovojn. “Mi ne komprenas. Ĉiam, kiam la benzino-metro indikas precize malplenecon, restas sufiĉe por veturi ankoraŭ cent kilometrojn. Tio povus permesi al ni transpasi la ŝtatlimon kaj replenigi sen pagi la kromimposton kiun postulas nia avara ŝtata registaro.

Tiel ni ŝparus preskaŭ kvar dolarojn.”

Dajna snufegis. “Ĝuste! Sed ĉiu scias ke tiuj mezurindikiloj montras malprecizan indikon. Vi devus ne riski elĉerpigon, precipe kiam ni havas rendevuon.” Refoje ŝi snufis. “Kia embaraso! Kion vi intencas fari?”

Parolis Rozmaria: “Ni ne maltrankviliĝu! Klara atendos ĝis nia alveno.”

“Nu,” ree demandis de dorse de ili la edzino, “kion vi intencas fari?”

Rikardo konsideris. “Restas ankoraŭ ĉirkaŭ dek kvin kilometroj por atingi Vengalon. Novakampo estas iom pli proksima. Mi haltigos pasanton kiu celas suden, kaj petos veturigon tien.” Li malfermis la pordon kaj eliris sur la bitumon.

La vojo tie trapasis ŝtatarbaron. La sunradioj apenaŭ penetris tra la foliamaso, kaj je iom post la dek-unua matene la aero ankoraŭ malvarmis. De la ĉirkaŭaĵo venis neniu sono. Eĉ ne kantis birdoj.

Ĉi tiun vojon li kaj Dafna kutime prenis unu fojon monate, veturante de sia hejmbieno por pasigi plurajn tagojn ĉe alia en la najbara ŝtato, kie ili tenis malgrandan bovaron. Kvankam estis neniam multe da trafiko, oni povus ordinaro anticipi pasi en la daŭro de duonhoro almenaŭ dekkelke da veturiloj. Hodiaŭ, tamen, ne. Ekde la neatendita haltigo aperis neniu. Eble, Rikardo konjektis, pro tio ke la lernejoj ferioj finiĝis la pasintan lundon.

Dafna mallevis apud si la fenestron. Vi devus kunporti kromproviz-

¹ Instrumento kiu indikas la kvanton da io.



on," ŝi riproĉe diris. "Mi ne scias kiom da fojoj mi tion konsilis. Se vi atentus, ni ne..." Ŝi ĉesis paroli. Aŭdiĝis de la nordo la zumado de motoro. Aperis ĉe la vojkurbo je distanco de cent kvindek metroj la ampleksa formo de artika kamiono. Rikardo levis la brakon, montrante la manplaton. La stiranto gestis amike kaj daŭrigis sian veturon.

"Diable!" Rikardo diris al si.

De la aŭto parolis ŝerceme Rozmaria. "Se mi starus apud la vojo kaj levus la jupon..."

Rikardo rigardis je la mensa bildo de sepdekjara virino kun grizaj haroj montranta siajn femurojn al pasanta aŭtisto. Sed, malgraŭ siaj jaroj, ŝi estis ankoraŭ vigla, kaj ŝi ja havis plaĉan humursenton.

Rozmaria estis longatempa amikino de Dafna. Vidvinigite antaŭ jardeko, ŝi daŭre loĝis en fora suda metropolo. Tamen ĉiun vintro-mezon, por eskapi iom da tempo de la malvarmeco, ŝi veturis norden kune kun sia kamaradino Klara kaj pasigis plurajn semajnojn en marborda feriejo. Kaj survoje ŝi kutimis gastigi du-tri tagojn ĉe Dafna kaj Rikardo en ilia bovbieno. Tiujn vizitojn li, samkiel lia edzino, ĉiam bonvenigis; ĉar, ekde la foriro de la lasta el iliaj nun plenaĝaj gefiloj, estis la kampara vivo iom tro trankvila.

Klara, en kies aŭto ŝi kaj Rozmaria vojaĝis, ordinare pasigis la saman tempon ĉe kuzo kiu loĝis en la apuda urbo. Ĉi-foje, tamen, la kuzo forestis, pro kio Klara daŭrigis sola la veturon por viziti alian

parencon en kampara urbeto distanca je ducent kilometroj kaj situanta en izolita loko okcidente de la ĉefa vojo. Estis aranĝite ke Rikardo kaj Dafna, survoje al sia alia bieno, veturigu Rozmarian al interkonsentita piknikejo iom norde de la ŝtatlimo, kie ili rendevuos kun Klara je la dek-unua kaj duono.

Rikardo konsultis sian brakhorloĝon. Estis jam ok minutoj post la dek-unua. Restis ankoraŭ ĉirkaŭ kvardek kilometroj da veturo. Estis neeble ke ili plenumos la rendevuon.

Denove ekaŭdiĝis de la nordo proksimiĝanta veturilo. Rikardo rapide malkroĉis la kapoton de sia aŭto kaj levis ĝin. Je lia peta gesto bremsiĝis malgranda ruĝkolora kabrioletoj kaj halt-



is ĉe la alia flanko de la vojo. Vokis juna vilkapa viro: "Ĉu vi paneis?"

Rikardo respondis trans la ŝoseo. "Nur pro manko de benzino. Se vi bonvolos veturigi min al Novakampo..."

"Certe! Ĝi troviĝas je nur pluraj kilometroj, ĉu ne?"

Rikardo kapjesis. "Ĉirkaŭ dek. Mi estas dankega." Kaj, al la du virinoj: "Mi sendube tie trovos iun kiu vojaĝas norden. Espereble mi revenos post dudek minutoj."

La junulo montriĝis komunikema. En la ĉefurbo kie li loĝis li renkontis ĉe dancejo la plej perfektan knabinon en la tuta mondo. Bedaŭrinde ŝi nur vizitantis en la metropolo, kaj post pluraj tagoj devis reiri al sia hejmo en la norda ŝtato. Li ĵus faris veturon tien por revidi ŝin. Metie li

estis elektristo, kaj dum la rekuniĝo li trovis tie dungigon. Li projektis translokiĝi je la fino de la monato.

Tiel parolema estis la bona samariano² ke Rikardo havis nek bezonon nek okazon multon diri, krom gratuli la junulon kaj refoje danki lin pro lia komplezemo.

Kiam aperis antaŭ ili la unuaj dometoj de Novakampo, demandis la stiranto: "Kiel vi reiros?"

"Mi esperas ke mi trovos ĉe la benzinservejo iun aŭtiston kiu vojaĝas norden kaj bonvolos veturigi min."

"Vi povus havi longan atendon. Pli bone estos se mi mem rekondukos vin."

"Sed restas al vi centoj da kilometroj antaŭ ol atingi la metropolon."

"Ne gravos se mi troviĝos ankoraŭ survoje post la sunsubiro. Neniu atendas min. Cetere, mi enuis vojaĝante sola, kaj estos bonvena via kompanio iom pli da tempo." Li forŝovis la pluajn protestojn de Rikardo. Ĉi tiu ĉe la unua servejo aĉetis kvin litrojn da benzino en malnova metala oleskatolo kaj ili ekveturis returne.

La du virinoj ankoraŭ sidis en la aŭto. La junulo helpis Rikardon enverŝi la karburajon³ kaj kun evidenta bedaŭro adiaŭis.

Estis nun dudek minutoj antaŭ

² Neatendita helpanto. (Biblia aludo). — Red.

³ Karburajo = hidrokarbida fuelo. (Ekz. benzino.)

la tagmezo. Dum ili refoje veturis, Dafna veis. "Kia embaraso!" ŝi ripetadis. "Kion pensos Klara?" Neniel efikis la trankviligaj vortoj de Rozmaria.

En la lima vilaĝo Rikardo plenigis la rezervujon je la senimposta prezo. Jam pasis kvaronhoro post la tagmezo, kiam ili finfine atingis la rendevuan lokon ĉe la fora ekstremo de kampara urbo. Videblis neniun signon de Klara.

"Ĝuste kiel mi anticipis," plendis Dafna. "Mi malfruas preskaŭ horon."


Rozmaria restis trankvila. "Klara ne daŭrigos la vojaĝon sen mi," ŝi diris. "Estas la lunĉohoro. Eble ŝi iris en la urbon serĉe al manĝo. Nur necesas ke ni atendu."

Dafna ne estis konvinkita. "Ŝi sciis ke ni alportos manĝaĵojn kaj trinkaĵojn por pikniko. Mi ne vidis ŝian veturilon kiam ni trapasis la urbon."

Rikardo staris apud la aŭto, rigardante jen norden jen suden laŭ la vojo. "Mi konsentas," li diris, "ke ni devas atendi. Dume, kial ni ne manĝu?" Li malŝlosis la kofron.

Manke de alia elekto, Dafna elprenis sandviĉojn kaj termoson kaj metis sur krudan lignan tablon apude en la parko. Ili manĝis kaj trinkis stare, kun la okuloj tenataj sur la vojo.

Familio kiu okupis tablon mal-supre apud rivereto pakis la restaĵojn de sia lunĉo, sidiĝis en sia terenveturilo kaj ruliĝis el la parko.



Ĉe la vojrandoj ili devis bremsi por eviti kolizion kun aŭto kiu, rapidinte de la nordo, senhalte enturniĝis. La stiranto estis Klara.

Malferminte la pordon kaj mal-kroĉante la sekurrimenon por eligi, “Mi tiom bedaŭras!” ŝi kriis. “Ĉu vi supozis ke mi vojeraris? Aŭ forgesis kie ni interkonsentis rendevuon? Ho! Kia mateno!”

Rozmaria iris renkonte. “Ne mal-trankviliĝu,” ŝi diris, “ankaŭ ni multe posttempis. Restas ankoraŭ pluraj sandviĉoj. Kaj kafo. Venu refreŝiĝi!”

Tra plenbuŝo da pano, bovaĵo kaj tomato, Klara rakontis. Ŝi ekiris de la domo de sia parenco je la deka kaj duono, certa ke ŝi disponas superfluan da tempo por veturi la sesdek kilometrojn al la rendevua loko, eĉ per la nepavimita kampara vojo. Post dudek minutoj, tamen, ŝi trafis vojbaron. Kamiono, descendinte tro rapide kurban deklivon kaj jorinte⁴ sur la gruzo, koliziis kontraŭ fosto ĉe la komenco de ponteto, kaj renversiĝis. Ĝia ŝarĝo de lanpakegoj dissterniĝis sur la vojo. Klara alvenis la unua al la sceno. Ŝi trovis la kamioniston en la kupeo, sen-konscia. Pro la tordita metalo ŝi ne povis atingi lin, des malpli liberigi lin. Ŝi rapidis returne al la urbeto por atentigi la aŭtoritatulojn, kaj sekvis al la loko policaŭton. Dume, alvokite per radiotelefono, venis de la kontraŭa direkto ambulanco kaj savveturilo. Bonfortune la kamion-

isto suferis nur rompitan kruron kaj cerban komocion. Estis duaranga afero rektigi kaj fortreni la kamionon kaj formovi de la vojo la lanpakegojn. Kiam finfine Klara povis rekomenci la veturon, estis jam pli ol kvindek minutoj post la rendevua horo.

La aliaj aŭskultis sen interrompi ŝin. Je la fino diris Rozmaria: “Kompare kun via travivaĵo, la kaŭzo de nia malfruego estas bagatela. Nia benzino elĉerpiĝis. Rikardo devis peti de pasanto veturigon por iri akiri provizon. Ni antaŭvidis ke ni trovos vin atendanta malpacience.”

“Ho! Benzino!” eligis Klara. “Pri tio mi ne pensis. Mi intencis replenigi la rezervujon ĉe la ĉefvojo, kie la prezo estas malpli alta ol en izolita urbeto. Post tiu aldonita veturado, estas mirakle ke mi ne jam trovis min haltigita.”



Dum Dafna repakis la piknikaĵojn, Rikardo elprenis la valizon de Rozmaria kaj portis ĝin al la alia aŭto. La amikoj ĝisrevidis kaj forveturis, Klara kaj Rozmaria suden al la plej proksima benzinservejo, Rikardo kaj Dafna norden en la direkto al sia bieno.

Post pluraj minutoj parolis Dafna. “Ni devas ĉiam kunpreni kromprovizon de benzino. Vi nun disponas malplenan skatolon. Mi restos maltrankvila ĝis vi plenigos ĝin.” □

⁴ Jori =



Laŭ persona vidpunkto:

LA HOMARA SUFERADO



de MARCEL
LEEREVELD

La du plej grandaj skurĝoj batantaj la homaron estas la daŭra kaj danĝera atakado (ate) de la ĉirkaŭa kaj ena naturo, kaj la malamika atakado (ate) de unuj homoj ante (= al) aliajn.

La inteligento kaj la scienco helpas la homojn defendi sin kontraŭ la atakoj de la naturo, kaj helpas ilin kondukti tiel ke ili povu pli-malpli harmonie vivadi en tiu naturo. Pro malsaĝaj interrilatoj inter la homoj, tiu helpo eviti la danĝerajn atakojn de la naturo direktiĝas al unuj homoj multe pli ol aliaj homoj. Krome la inteligento kaj la scienco ne ĉiam estas sukcesaj.

La same ĉiaspecaj atakoj de unuj homoj al aliaj homoj same kaŭzas grandegan suferadon. Por kontraŭbatali ankaŭ la interhoman malpacadon, la inteligento kaj la scienco devus sukcese helpi. Ni povas tamen konstati ke, por evitigi interhoman suferigadon, la inteligento ne multe helpas la homojn, kaj eĉ malpli la scienco.


Por esti kaj resti sanaj, mense kaj korpe, la plej grandaj taskoj de la tuta homaro kaj de ĉiu homo

individue, estas do unuflanke defendi sin kontraŭ atakoj de la naturo, kaj aliflanke malaperigi la suferigadon (ate) de unuj ante (= al) aliajn homojn. Eĉ se interhoma malpacado ne ekzistus, la suferado pro nefacile eviteblaj atakoj de la naturo (malsanoj, akcidentoj, ktp) jam estus tiom grandega, ke estus stulte pliigi tiun suferadon per interhoma suferigado.

Ni multe faras por mildigi la atakojn de la naturo, kvankam ne sufiĉe ĉiuinkluzive (ĝuste pro nia neinteligenta kaj nescienca traktado ante [= de] interhomajn rilatojn). Nia plej urĝa tasko koncernas do la duan danĝeron: la interhoman atakadon. Tio koncernas la sociajn interrilatojn inter la homoj, kiuj rilatoj kreas aŭ interbataladon aŭ interhelpadon.

Ĉar evidente la sociaj rilatoj preskaŭ ĉie en la mondo estas tiaspecaj ke ili kaŭzas aŭ daŭrigas interhoman atakadon anstataŭ helpadon, nia precipa tasko estas la ŝanĝo de tiuj sociaj interrilatoj, ĉar nenio alia povos senigi nin de la grandega suferado. Tiu tasko estas tiom urĝa kaj necesa ke ĉiuj aliaj problemoj estas nur flankaj. Ĉi tiuj duagradaj problemoj inkluzivas eĉ la limigitajn lokajn interhelpojn inter la homoj, kiujn faras movado kia Amnestio Internacia, religiulo kia Patrino Terezo, kaj sennombraj aliaj grupoj kaj personoj uzantaj provizorajn rimedojn por mildigi iom la suferadon sed ne ŝanĝantaj la sociojn nunajn, la kaŭzon de la grandega homsuferado. □

INSTRUISTA ANGULO



salutas vin jenny bishop

Gratulon al ĉiuj membroj de ILEI kiuj ebligis fondiĝon de Aŭstralia sekcio de ILEI, akceptita de la estraro en la 31a ILEI-Konferenco ĉe Avalon apud Melburno, aŭguston 1997. Nia unua tasko por 1998 estas re-aligi al ILEI per nia propra kassistino Dianne Lukes, kiu nun pretas akcepti kotizojn de \$25. Ĉi tiu sumo inkluzivas jarkotizon al ILEI, kvar numerojn de *Internacia Pedagogia Revuo*, kaj malgrandan sumon por niaj enlandaj aranĝoj kaj aprobitaj elspezoj. Tiuj instruantoj kiuj partoprenis la Esperanto-Somerlernejon en Ipswich jam profitis la novan sekcion kaj espereble jam aliĝis por la nova jaro. Pro la diverseco de niaj lernantoj ni devas ĉiam elpensi novajn rimedojn — materialojn, metodojn, kaj ruzojn por kapti kaj retenigi ilian intereson. Pro tio ni ankaŭ daŭre lernas kaj malkovras novajn teknikojn kiujn ni povos proponi kaj diskuti kun niaj disaj gekolegoj. Se ankoraŭ ne, ĉu vi intencas fari la superan ekzamenon por certigi vian propran kompetentecon kiel instruisto?

Kiel unua estro de la sekcio, mi vokas vin, ĉiuj gelegantoj de *ESK*, al diskutado por helpi al pli bona kaj pli efika instruado de Esperanto en Aŭstralio. Kiaj estas viaj spertoj?

Ĉu via klubo funkciigas kurson ĉe la klubejo aŭ ĉe alia loko?

Ĉu vi disponigas la senpagan perkorespondan kurson de AEB? Se jes, kiu elcentaĵo kompletigas la kurson kaj ĉu vi uzas la plej ĝisdatan version?

Ĉu vi disponigas kursojn de la Perkoresponda Servo de AEA fare de Hazel Green kaj Dianne Lukes? Ĉu la kursoj estas bonaj? Kiel ni povus plibonigi ilin?

Ĉu vi konas iun kiu lernis per kurso sur Interreto?

Kiom da kursoj estas sur la Reto? — por Anglaparolantoj, por alilingvanoj?

Ĉu vi kutimas surfi la Interreton? Kion interesan vi trovis?

Kiamaniere vi allogas novajn gelernantojn?

En via klubo, ĉu la membroj plejparte instruas al si mem, ĉu ili lernas per koresponda kurso aŭ ĉu ili lernas per kursoj en la klubo mem aŭ alie? Jen kelkaj kuraĝigaj temoj por diskutado ĉe nia rubriko, kiuj eble povos helpi por pli daŭra kaj pli efika lernado de Esperanto.

Mi anticipe dankas viajn reagojn kaj kontribuojn. Intertempe, instige mi atentigas ke ĉi tie en Aŭstralio, la plejmulto de bonaj Esperantistoj estas meminstruataj; kaj la nuna tasko de la kluboj kaj instruistoj estas serĉi jam starigitan grupon kun komuna intereso, eble rilata al in-

ternaciismo aŭ voĵagado, kiu havas kaj tempon kaj intereson lerni kaj uzi la Internacian Lingvon. Se vi jam trovis tiajn grupojn eble ni ĉiuj povos profiti la informon. □

salutvortoj de duncan charters prezidanto de ILEI

al la Aŭstralia konferenco, 1997

Estimataj kolegoj kaj kunlaborantoj:

Estas por mi granda ĝojo ke povis okazi nia ĉi-jara konferenco en Aŭstralio. Unue, la lando dum jardekoj serioze kontribuis al la Esperantomovado kaj al la instruado de la internacia lingvo. La elekto de la insula kontinento kiel loko de la Universala Kongreso donis al ni la okazon omaĝi la pasintan kaj nuntempan laboron tiucele. Tio inkluzivas la profesie kompetentajn iniciatiojn kun kiuj vi konatiĝos en la konata Universitato Monash, el kies programo venis unu el la plej mondkonataj specialistoj pri la instruado de fremdaj lingvoj kaj iliaj kulturoj, Wilga Rivers, kiu daŭrigis sian karieron en Usono ĝis la universitato Harvard. Ni sincere dankas al Jennifer Bishop kaj al ĉiuj lokaj kunlaborantoj kiuj ebligis al la ĉeestantoj labori en tiel ĝuinda loko kiu bele reprezentas la specialan etoson de nesufiĉe konata lando. Estas por mi granda bedaŭro ke mi ne povis persone havi kun vi tiun

sperton, sed mi estas kun vi spirite kaj esperas povi alimaniere kontribui al via laboro. Lige kun la konferenca temo "Multkultureco kaj Lingvolernado", mi jam anticipe preparis skizan enkondukon al ĝi por *Internacia Pedagogia Revuo*, sciante ke ne estos ebla mia propra partopreno. La lerno de lingvo sen ĝia kultura kunteksto estas ne plu pensebla en mondo kie miskomprenoj pri pensmanieroj kaj kutimoj inter diversaj sociaj grupoj naskas kaj daŭrigas multajn el la plej agacaj kaj persistaj problemoj de la homa vivo. Necesas ke ni serioze ekzamenu la rolon de Esperanto, ĝian propran ideologian kaj kulturan bazon, kaj ĝian kapablon malfermi la okulojn kaj la menson al tiuj kulturtraĵoj de la homaro kiuj sentigas nin unuecaj kun aliaj homoj, de kiu ajn nacia aŭ socia origino ni estas. Per niaj diskutoj, ĉu pri kulturaj aŭ organizaj demandoj, ni mem estu ekzemplo per klarvida kompreno ke malsamaj spertoj, origino, kaj esprimmanieroj ne rajtas influi negative la valoron kiun ni nature aljugas al la kontribuo de ĉiu individuo. La historio instruas ke unueco ne venas nur per komuna lingvo. Nia tasko estas demonstri ke per komuna lingvo kiu psikologie egaligas la komunikteron, ni povas lerni kiel kompreni la kazojn de konfliktoj kaj antaŭenigi veran komprenon surbaze de sentebla plivalorigo de ĉiu individuo.

Antaŭ du jaroj mi parolis pri la fakto ke ĉe la sojlo de novaj jarcento kaj jarmilo la teknologio efektive

favoras nin, kiel gi demonstreble favoris multajn avangardajn iniciatojn de individuoj aŭ grupetoj kun firma mondpliboniga celo. Ni estas jam pli proksimaj al la efektivigo de eksperimentoj kiuj pli definitive montros la valoron de nia lingvo kiel praktika kultura perilo kaj komprenigilo.

Niaj taskoj restas defiaj tamen pli realigeblaj se ni sukcesos difini la laborterenojn kaj la rimedojn per kiuj ni atingos niajn celojn. Dum la venonta jaro ĝis la Kongreso en Montpellier mi dediĉos min al antaŭenigo de nia laboro kaj invitas al vi pliaktiviĝi por pluporti laboron. Nia laboro ĝuste nun povas esti maksimume efika ĉar ni havas rimedon kiu respondas al la urĝaj mondbezonoj nunmomentaj.

Mi finas dezirante al vi fruktonan laboron, kaj efikan planadon por la venontaj jaro kaj jarmilo! □

.....



Ĉagrenite, viro diras al amiko: “Mia hundeto forfuĝis antaŭ du tagoj kaj mi ne retrovis ĝin.”

“Kial vi ne aperigas anonceton en *Eventoj*?”


“Estus senutile, la povra hundeto ne scipovas Esperanton.”

[el *Eventoj*, n-ro 135, 1/oktobro-97] □



POSTRAPORTO EL NOV-ZELANDO

raportas HOWARD GRAVATT



NZEA havas bonan kaŭzon esti tre kontenta pri la sukceso de la Oficiala Postkongresa Ekskurso al Nov-Zelando, kiam sepdek unu Esperantistoj el dudek landoj vizitis nian landon inter la 30-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto, 1997. Tiu sukceso multe dependis de la ĉeforganizisto kaj ĉiĉerono Bradley McDonald kaj Con-Tiki Tours. Bradley estis kapable asistata de David Ryan kaj lia edzino Celina. Ankaŭ mi estis tre privilegiita akompani la grupon kiel ĝenerala helpanto.

...Post kiam la ekskurso oficiale finiĝis kun multaj bonkoraj esprimoj de bondeziroj, multaj el la grupo decidis pasigi plian tagon en Aŭklando. Ni esperu ke Nov-Zelando kaj Nov-Zelandanoj sufiĉe imponis niajn vizitantojn por ke ili favore informu kunesperantistojn kaj samlandanojn pri ni.

[Estraktita el detala raporto en *Argenta filiko* sept. 1997] □





Bahaismo kaj Esperanto, Festlibro okaze de la dudekkvinjariĝo de Bahaa Esperanto-Ligo. Redaktoro ne indikita. Eldonis Bahaa Esperanto-Ligo, Frankfurt, 1997. 58 A4-formataj paĝoj. Ilustrita, broŝurita.

Tre bele eldonita kaj zorge presita libro, kun enhavo bone elektita, tre informa por kaj Bahaanoj kaj ne-Bahaanoj.

Kiel nereligiuulo, mi ne povas juste taksi la indecon de la Bahaa Kredo. Sed kiel Esperantiston, min multe interesas ĉi tiu verko, parte pro ĝia detala biografieto de Lidia Zamenhof, (filino de L.L.Z.), parte pro ĝiaj historiaj informoj, kaj ankaŭ pro ĝia detala prezento de la oficiala Bahaa vidpunkto pri lingvo internacia kaj Esperanto.

Ĉefe substrekita estas la oficiala Bahaa vidpunkto ke Esperanto *ne* estas iel oficiale aprobita aŭ akceptita en la Bahaa medio. La oficiala vidpunkto estas

ke la enkonduko de internacia helpa lingvo kaj de komuna skribo estos la tasko ne de la bahaa komunumo, sed ke 'la registaroj de la mondo pere de

siaj parlamentoj estas alvokataj efektiviĝi tiun ĉi gravegan leĝon'. Unue devos okazi vasta esplorado, diskutado kaj interkonsiligo surbaze de kiu fine venos la komuna decido.


— plej verŝajne, tamen, laŭ la vidpunkto de la Bahaa estraro, tiu lingvo ne estos Esperanto, sed estos pli verŝajne la Angla lingvo. Plej gravas ke iu lingvo estu elektita:

La Universala Domo de Justeco sentas ke...[la bahaanoj] farus bone se ili subtenus la ideon ĉiam kiam eblas kaj preĝus ke la tempo ne plu foras kiam la registaroj de la nacioj adoptos unu solan lingvon por esti instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel helpa al la gepatra lingvo de la lernantoj.

Tamen, kvankam la Bahaa estraro (la Universala Domo de Justeco) ne mem precipe favoras Esperanton, la Bahaa Esperanto-Ligo estas oficiale aprobita, kaj ĝia ĉefa tasko estas disvastigi la Bahaan Kredon inter Esperantistoj, t.e. konverti jamajn Esperantistojn al Bahaismo. Krome, Bahaanaj Esperantistoj devas diskonigi la ideon pri lingvo internacia (kvankam ne nepre Esperanto) kaj prepari la mondon por tiu estiĝonta fenomeno.

La libro tre firme emfazas ke, laŭ Zamenhof, Esperanto ne celas esti nur lingvo aparta, sed estas senvalora se ĝi ne estas kombinita kun monda religio — vidpunkto kiun partoprenas la Bahaa movado.

Pri ambaŭ ĉisupraĵaj principoj mi multe dubas. Sed indas la libro. □



Recenzas Donald Broadribb

Ekstreĵoj, de Miguel Fernández, Jorge Camacho, Gonçalo Neves, Liven Dek. Eldonis Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno, 1997. 207p., broŝurita.

Kolekto de noveloj: Miguel Fernández, Jorge Camacho, kaj Liven Dek ĉiuj kontribuis novelojn pri amo trans morto, sinmortigo, toleremo, venĝo, malfidelo, unua amora sperto, aidoso [AIDS], kaj seksa memkontentigo; Gonçalo Neves kontribuis novelojn pri amo trans morto, sinmortigo, toleremo, kaj venĝo. La amplekso de la noveloj varias de du ĝis dek unu paĝoj.

Se vi amas plurfoje en ĉiu paĝo kontroli vortojn en vortaro, vi nepre amos ĉi tiun libron, kvankam ne ĉiujn vortojn vi trovos en via vortaro (eĉ ne *PIV*) nek en la ampleksa Glosaro fine de la libro. Tio vere preskaŭ mortige ĝenas la legadon,

ĉar kvankam multaj el la “neologismoj” estas evidentsignifaj, pluraj — eĉ kernaj por la signifo — estas nediveneblaj. Verŝajne profunda scio pri la vorttrezoro, precipe la stratularvortoj, de la Hispana kaj Portugala lingvoj helpus — ŝajnas al mi ke la verkintoj ĉerpis multe el tiu fonto.


Ke la verkintoj havas talenton, estas klare. Domaĝe, ili estas kva-zaŭ iniciatantoj de serioza literaturo amnovela en Esperanto, tial ili havas nenian jam establitan mezurilon al kiu kompari la altecon de la kvalito de siaj verkoj. Konsekvence, la artnivelo de la noveloj multe varias.

La enhavo de pluraj (multaj?) el la noveloj ŝokis multajn recenzantojn, kiujn tamen ŝajne ne ĝenas la noveloj de Chaucer, kiuj estas multe pli malprudaj — liaj *Rakontoj de Canterbury* verkiĝis antaŭ 600 jaroj, kiel tio iel akceptindigas temojn kaj priskribojn, dum nuntempeco malindigas similaĵojn? Nu, ĉu Fernández, Camacho, Neves, aŭ Dek estas egale talenta kiel Chaucer samaĝe? (Chaucer estis jam 43-jara kiam li ekverkis la *Rakontojn de Canterbury*; niaj aŭtoroj estas nur 30 ĝis 37-jaraj.) Nu mi ne aŭdacas aserti tion; nek nei ĝin. Eble... eble...

Kaj la abundaj neologismoj? Nu, Shakespeare inventis pluroble pli da vortoj ol nia kvaropo, en siaj verkoj. Do, ĉiu al sia propra gusto.

Nia literaturo elkerne bezonas maturiĝi, kaj ĉi tiuj “junaj Turkoj” brave kontribuas siajn brikojn al la konstruado. □

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18 19 20 21 22 23 24 25 26 27 28 29 30 31 32 33 34 35 36 37 38 39 40 41 42 43 44 45 46 47 48 49 50 51 52 53 54 55 56 57 58 59 60 61 62 63 64 65 66 67 68 69 70 71 72 73 74 75 76 77 78 79 80 81 82 83 84 85 86 87 88 89 90 91 92 93 94 95 96 97 98 99 100



**RECENZAS
DONALD
BROADRIBB**

Jack Vance: (*Trigamba Joĉjo*), tr. Ĝan Ŭesli Starling, helpe de Németh Csaba k.a. Mistera Sturno, Kalamazoo (Usono), 1997. 71p., broŝ. Prezo: US\$2.00. Aĉetebla ĉe la tradukinto, Ĝan Ŭesli Starling, 224 Rose Place, Kalamazoo MI 49001-2617, Usono.

George Bernard Shaw, en sia testamento, postlasis monon por ke eksperta komitato preparu novan skribsistemon por la Angla lingvo. Tiu komitato ja preparis sistemon, kaj Anglalingve publikiĝis la dramo de Shaw *Androcles and the Lion* kun paralelaj normskribaj kaj novskrib-sistemaj versioj.

Siavice, Usona Esperantisto adaptis la novan skribsistemon al Esperanto, kaj ĉi tiu libro estas la unua el eble iam aperontaj verkoj per kaj pri la Shaw-a skribsistemo. En ĉi tiu libro la nova skribsistemo prezentiĝas iom-post-iome, tiel ke la studanto facile enmemorigas la novajn signojn. La celo de la nova sistemo por la Angla lingvo estis elimini kaosan literumadon kaj uzi nur unu signon por ĉiu fonemo. Por Esperanto tiu celo ne estas necesa, do la

Esperantigo de la sistemo estas ĉefe por amuzi, distri, ludado; kaj eble por plifaciligi rekonon kaj skribon de la literoj, por personoj kiuj suferas fizikan nekapablon.

Mi trovis ke lerni legi la novan skribsistemon estas relative facile, sed ankaŭ tre konfuze. La "logika" formado de la skribsignoj prezentas grandan problemon por disleksiaj personoj kaj disleksietaj. Ekzemple,

└	┌	└	┌
b	v	f	p

Ankaŭ la vokaloj tre konfuzas:

└	┌	└	┌
a	e	u	o

En nia aktuala alfabeto ni ja havas similan fenomenon, kvankam ni iomete plifaciligas la rekonon per la utiligo de suprenirantaj aŭ subenirantaj vertikalaj:

b p d q

kaj multaj personoj konfuzas

g q

Sed anstataŭ kuraci tiun problemon, la Shaw-sistemo ankoraŭ pliintensigas ĝin.

Kvankam la skribsistemo surface aspektas iom stenografia, la tradukinto Starling certigas al ni ke ĝi ne estas taŭga por stenografia uzado, ĉar ĝi estas nek rapide farebla, nek enhavas la multajn mallongigojn necesajn por stenografio. Se vi amas enigmojn, vi ĝuos deĉifri la libron. □



Deziras Korespondi



Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originaj leteroj de la ĉisube listigitaj personoj estas haveblaj ĉe tiu adreso.

Se vi deziras aperigi korespondpeton en ĉi tiu rubriko, bonvolu kontakti Betty Aulsebrook.

/ MARJAM SARMASTI, P.O. Box 14455/137, Tehran, Irano. 34-jara Esperantistino — bibliotekistino, diplomita pri informscienco. Deziras korespondi kun gesamideanoj. [La originala letero de ĉi tiu koresponddeziranto haveblas de la redaktoro.]

La ĉisekvaj kvar personoj estas membroj de la Esperanto-Klubo "Pacifiko" en Vladivostoko, Rusio:

/ ANDREJ ŜIPILOV: Li estas instruisto pri arkitekturo en la Teknika Universitato. Liaj interesoj estas moderna arkitekturo, urboplanado, klasika teatro, desajno de lignaĵoj, mebloj. Li estas 27-jara, kaj deziras korespondi kun gesamaĝuloj kaj gepliagaĝuloj.

/ JULIA ŜIPILOVA: Ŝi okupiĝas pri projektado kaj kudrado de vestoj, kaj interesiĝas ankaŭ pri klasika teatro, fitodezajno (bukedoj).

/ NATALIA FOKINA: Ŝi estas studento pri arkitekturo. Krom sia profesio, ŝi interesiĝas pri lingvoj: la Angla, Germana, Hispana, kaj certe Esperanto. Ankaŭ ŝi ludas akordionon.

/ TATIANA FOKINA: Ŝi estas studento pri internaciaj rilatoj en Fororienta Ŝtata Universitato. Ŝi ŝatas sportojn, muzikon — klasikan kaj alternativan, librojn (precipe de Jules Verne, Arthur Conan Doyle, Zoŝĉenko, Puŝkin, kaj multaj aliaj). Ŝi estas 18-jara.

Adreso por ĉiuj kvar:

Esperanto-Klubo "Pacifiko"
OIAK
ul. Svetlandskaja 50
RU-690600 Vladivostok
Rusio



POR RIDIGI VIN



Dum ekzameno pri fiziko, profesoro demandas studenton: "Kiel vi povus per barometro mezuri la altecon de turo?" Respondo: "Mi irus sur la turon kaj faligus la baromentron al la tero. La tempon de la falado mi mezurus. Per tiu mezuro eblas kalkuli la altecon." La profesoro, kiu ja ne diris ke la barometro restu sendifekta, devis akcepti la respondon.

[el *Tamen Plu*]

ESPERANTO IN NEW FILMS

Gattaca

La Eta Knabino

This past October 24 was the premiere of Columbia Picture's new science fiction film *Gattaca*, written and directed by Andrew Niccol. The plot: in a society of genetically engineered people, a naturally born man, Jerome (Ethan Hawke), pretends to be part of the genetic elite in order to take part in a space mission. However, one week before the mission, doubts are raised about his origins, and even the woman he loves (Uma Thurman) is suspicious of him. Esperanto is used in some of the dialogue, principally in announcements heard through the Gattaca Corporation's loud speakers. The Esperanto is spoken by Marisa John and Mike Sloper of the Esperanto League for North America.

A short film, *La Eta Knabino* ("The Little Girl") directed by Zurich director Samir, was presented in the Locarno Film Festival this past August 13. Dialogue was voiced by Dietrich Weidmann and the Esperanto Society of Zurich.

[From *esperanto/UEA*, Oct. 1987]

ESPERANTO TEACHERS AND CAMPAIGN 2000

A meeting of the International League of Esperanto Teachers (ILEI) was held during the Universal Congress of Esperanto in Adelaide last year. The principal topic was the contribution of ILEI to Campaign 2000, our "International Year of Esperanto". Participants in the meeting gave special attention to the training of Esperanto teachers and instructors, without whom quality teaching and study of Esperanto is not possible. ILEI plans to hold a week long seminar in 1998 before the Universal Congress which will be held in Montpellier, France. There will also be opportunity for ILEI to organize a Forum, during which Congress participants and Esperanto teachers will be able to bring up questions connected with problems they face while teaching Esperanto. ILEI will be interested in compiling a book of *Advice for Teachers compiled* from answers to the most common questions and problems presented by Esperanto teachers.

[Interredaktore]

LATIN BREAKS THE SHIRT BARRIER

A sign of the times perhaps? A company in Connecticut, in America, is selling tee-shirts featuring a Latin quote of the month. Among one of the first, the immortal phrase *Calcitra Pugam*. Guess what it means!

AUSTRALIAN ESPERANTO AUTHOR INTERVIEWED

Over the past seven years Ron Gates (74) has become one of the most prolific Esperanto authors, writing detective stories: six books have been published, and more are in the drawer. We met him in Adelaide, where he was convenor of the International Congress University.

You lectured in the ICU on "The ugly century", passing severe judgment on art in this century. Why did you, an economist, speak on a question of aesthetics?

You should know that since I retired in 1985 I have no longer considered myself an economist. Now I breed cattle, am occupied with Esperanto, etc. So when I received the invitation to lecture at the ICU, I felt myself free to speak on something that interests me more: why most contemporary art seems to me to be not worth considering. Actually, I found part of the answer in economics.

We can read that answer in the published collection of ICU lectures. But perhaps it is your detective novels and stories that will meet with a wider readership. When did you begin to write them?



Prof. Ron Gates

Soon after I started learning Esperanto, in 1987 at the suggestion of my friend Ralph Harry. Actually, I simply wanted to find out whether I am capable — after so many studies of economics — of writing fiction. One day I simply set out to write, with no thought about the plot: I put the characters in a situation and waited to see what they would do. I was merely interested in amusing myself, but Ralph Harry and Trevor Steele encouraged me to send the manuscript to the Flanders Esperanto-League, which accepted it, *La Septaga Murdenigmo* ("The Seven Day Murder Mystery"), for publication.

Have you not written in English? Could only a new language give you the urge?

The English language competition is too strong. However, I have translated my first novel into English: handwritten, for my family. But I have found the book in English insists on becoming something different...who knows, maybe even a different person has to do the murder!

Do you have many manuscripts still to be published?

When FEL had published three of my books, I already had five more ready. FEL said the market could not swallow so many so quickly! Well, the International Esperanto Museum in Vienna is going to publish something by me, a partly autobiographical love novel, *La Vidvino kaj la Profesoro* ("The Widow and the Profesoro"). In the meantime I am writing another love story, *Semajno en la kamparo* (A Week in the Country").

[From *esperanto/UEA Oct. 1997*]

Prof. Gates' published fiction in Esperanto includes:

La Septaga Murdenigmo ["The Seven Day Murder Puzzle"] 1991. — novel.

Sep Krimnoveloj ["Seven Crime Stories"] 1993. — short stories.

Kolera Afero ["An Angry Affair"] 1994. — Short stories.

Refoje Krimnoveloj Sep ["Seven Crime Stories Again"] 1994. — Short Stories.

Morto de Sciencisto ["Death of a Scientist"] 1995. — Novel.

Tria Kolekto da Krimnoveloj ["Third Collection of Crime Stories] 1996. — Short Stories.

La Vidvino kaj la Profesoro ["The Widow and the Professor"] 1997. — Novel.

.....

UNIVERSITY POSTS

A new chair of Interlinguistics and Esperanto has been established at the University of Amsterdam, in the Netherlands. The incumbent professor is Dr Marc van Oostendorp, from the Dutch Institute of Generative Linguistics at the University of Leiden.

In Britain, a 90 hour first year course in Esperanto has opened at the University of Salford as part of a language degree program. The lecturer is Paul Gubbins.

[From *esperanto/UEA Oct. 1997*]

.....

UNESCO AND ESPERANTO

The *Universala Esperanto-Asocio* (UEA) and the *Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj* (ILEA: International League of Esperanto Teachers) have been awarded the status of "Operational Relations" with UNESCO, along with 276 other NGO's (Non-Governmental Organizations). 16 NGO's are in Associative Relations with UNESCO, and 63 in Consultative Relations.

RECENT ESPERANTO WORLD LITERATURE

Some of the more significant new books published in Esperanto during the past six months include:

Translations of world literature

Alfredo d'Escragnolle Taunay, *Inocenta*, tr. Geraldo Pádua. Chapecó (Brazil): Fonto, 1997. 237p. ("Innocent". Portuguese original: 1872)

Victor Hugo: *Hernani*, tr. Georges Lagrandge. Paris: UFE, 1997. 60p. (French original: 1830)

Pablo Neruda: *Dudek poemoj amaj kaj unu despera kanto*, tr. Fernando de Diego. Chapecó (Brazil): Fonto, 1997. 80p. ("Twenty-one love poems and one desperate song". Spanish original: 1924)

Menotti del Picchia, *Joêjo Mulato/La Maskoj*, tr. Geraldo Mattos. Chapecó (Brazil): Fonto, 1997. 108p. ("Johnny Mulatto/The Masks". Portuguese original: 1917)

J.R.R. Tolkien, *La reveno de la reĝo*, tr. William Auld. Jekaterinburg (Russia): Sezonoj, 1997. 399p. ("The Return of the King". English original: 1955). Third volume completing the translation of the trilogy *The Lord of the Rings*.

Original Works in Esperanto

William Auld, *Pajleroj Kaj Stoploj*. Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ("Straws and Stubble". Collection of brief essays, reviews, poems, etc.)

Aira Kankkunen, *Kaj tiam floris la ĉerizarboj. 1. Kune kun miaj kunvojaĝantoj; II. Viv-observoj*. Göteborg, 127p. ("And then the Cherry Trees Bloomed. 1. Together with My Travel Companions. II. Observations of Life"....Short stories and essays)

Paula Mährti [pseudonum], *La Manto (Mantis religiosa)*. Chapecó (Brazil): Fonto, 1997. 182p. ("The Mantis". Erotic autobiographical novel)

Special

Fervoja Vortaro. Railway dictionary, Esperanto to and from Czech, Danish, Dutch, English, French, German, Hungarian, Italian, Polish, Portuguese, Rumanian, Spanish, and Swedish. 13 vol., each 328-434pp., based on the second edition of the RailLexic CD-ROM. Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj: 1997.

CD: *Unu Voĉo*. Ewe-Calpytus. Adelaide, 1997. 61 min. ("One Voice". Traditional Australian songs.)



ALAN TOWSEY

LINGVA ANGULO



PO

De nia estimate redaktoro mi ricevis la jenan leteron (ĉu neniu alia havas nun problemojn pri nia lingvo?!):

Ankoraŭ oni havas problemojn pri *po*! Mi ne plene komprenas la kialon. Sed mi ĵus legis:

Pro timego ni dormas en la enirhalo sur la sofoj: ni donis ilin du po persono. Ili estas komfortaj.

Efektive, mi ne scias kion la verkinto celas diri. Temas pri situacio okazinta post tertremego en Italio, kie pro detruigo de hoteloj necesis provizi dormlokojn al turistoj. Ŝajne la citaĵo diras “we gave them two sofas each (to sleep on)”, sed estas verŝajne, en tia situacio, ke ĝi celas signifi “we slept them two to a sofa”. Ĉu vi bonvolos reverki la frazon por ke la signifo estu evidente klara, kaj ankaŭ gramatike korekta, kun denova ekspliketo? (Ne longa pritrakto, io mallonga sed ege klara.)”

Antaŭ ol legi tion, kio sekvas, oni bonvolu relegi mian artikolon pri *po* en *ESK* de Nov.-Dec. 1996. Sekvante

la principojn diskutitajn en tiu artikolo mi do ŝanĝus la frazon cititan en la letero de Donald jene:

Pro timego ni dormas en la enirhalo sur la sofoj; ĉi tiujn ni donis po du al ĉiu persono. (= ... we gave two of these (sofas) to each person)

La sofoj devus esti tre larĝaj se oni metus du personojn sur ĉiun!

LA STRUKTURO DE ESPERANTO

Kun granda intereso (kaj iom da amuzo!) mi legis la “Prilingvaj(n) Debatoj(n)” en *ESK* de Nov.-Dec. 1997, precipe la komentojn de nia estimata kolego Marcel Leereveld, kies profundan scion de Esperanto mi alte taksas kaj respektas.

Ŝajnas al mi tamen, ke Marcel celas ion kio ne estas ebla: absoluta perfekteco de Esperanto. Li ŝajne volas ke estu nenia nereguleco en Esperanto, nenia ebleco de konfuzo, ke ĉiu vorto kiom eble havu nur unu signifon. Neebla sonĝo! Li volas starigi striktajn regulojn pri la uzado de ĉiu vorto kaj konstruo, kiujn rompi estas permesate al neniu. Ĉu mi miskomprenis lin?

Antaŭ ankoraŭ nemultaj jaroj, kleraj profesoroj kaj “spertuloj” pri lingvoj aroĝis al si la rajton preskribi fiksjajn regulojn pri “ĝusta” gramatiko — en la Angla, ekzemple, malpermesante la dividitan infinitivon (“to boldly go...”), prepoziciojn ĉe la fino de frazo (“Give me a knife I can cut with”), aŭ, en la Franca, la dekretoj de la *Académie Française*. Sed la moderna lingvistiko ne plu pensas

tiel; ĝia sola gvidanto estas la uzado — la uzado de la popolamaso, la antaŭa uzado de agnoskito “bonaj” verkistoj kaj parolantoj, eĉ se tia uzado “rompas” la antaŭe akceptitajn regulojn. (Eĉ Ŝekspiro skribis “between you and I” (*Merchant of Venice*, Act III, Scene II, l. 321)!)

Mi konfesas ke, kiam mi komencis ĉi tiun serion, mi mem emis pensiom simile kiel Marcel. Sed mi lernis el mia spertado! Mi do ne estas kulpa pri “blinda herodorado”, kiel asertas Marcel, kiam mi citas PIV, PAG (kiuj plejparte nur raportas la uzadon kaj faras rekomendojn — pri kiuj mi ne ĉiam samopinias!) aŭ bone konatajn aŭtorojn, kiaj Piron aŭ Lagrange. Tiujn mi citas ne pro herodorado, sed nur kiel ekzemplojn de uzado. Kiel mi diris en la diskutata artikolo, “nur la uzado decidus”.

Ni ja povas, surbaze de logiko, klareco, utileco, kontraŭstari iun novan uzon aŭ vorton, kaj tiel farante iom “bremsi” tro rapidan ŝanĝon. Sed se malgraŭ ĉiuj niaj penoj tiu nova uzo aŭ vorto persistas, ni nur povas bedaŭri, rezigni kaj akcepti. Eĉ Zamenhof, en sia *Antaŭparolo* al la *Fundamento de Esperanto*, kvankam emfazante ke “*La fundamento devas resti severe netuŝebla*”, samtempe ankaŭ atentigis ke tio ne volas diri

ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *plibonigi* kaj *perfektiĝadi*; la ne-

tuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj *ŝanĝado*, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo *natura*, senkonfuza kaj sendanĝera.

Plue, Esperanto ne estas, kaj neniam estos, “perfekta”. Nenio estas perfekta! Efektive, miaopinie, unu el la ĉefaj kialoj pro kiuj Esperanto de tiel longe ankoraŭ vivas estas la fakto ke ekde la komenco ĝi enhavas neregulaĵojn, esceptojn kaj plursencajn vortojn. Ĝi do tuj plaĉas al niaj homaj mensoj, kiuj iel trovas — eble pro siaj travivaĵoj — perfektecon iom nenatura.

Esperanto ne estas “facila” lingvo. Neniu lingvo estas facila. Ĉiu lingvo postulas multe da penego por ellerni ĝin. Ni diru, prefere, ke Esperanto estas malpli malfacila kaj pli regula ol la tiel nomataj “naturaj” lingvoj. Sed ĝi tamen havas problemojn — se tio ne estas vera, kial necesis ke Zamenhof verku la *Lingvaj(n) Respondoj(n)*, aŭ ke Marcel verku sian libron *Por Ĝuste Uzi Esperanton*, aŭ ke mi verku ĉi tiun serion?

Plursencaj vortoj ekzistas en la lingvo ekde la komenco — Zamenhof mem donis al *de* preskaŭ dekduon da signifoj, ekzemple:

- movo el iu loko (veturi de Sidnejo al Melburno)
- tempo (Mi staras ĉi tie de du horoj)
- kaŭzo (tremi de febro, paliĝi de

kolero)

- pasiva aganto (Li estas amata de ĉiuj)
- aparteneco (Tio dependas de la cirkonstancoj)
- posedo (la libro de la knabo)
- mezuro (sumo de cent dolaroj)
- limigita kvanto (peco de la kuko kiun vi ĵus aĉetis)
- aktiva aganto (la amo de gepatroj al siaj infanoj)
- objekto de ago (mortigo de homo estas krimo).

Hazarda trafolio de iu ajn vortaro rapide malkalŝas multajn ekzemplojn de plursenceco:

- rulo da papero²
- rulo de skribmaŝino
- ruleto — ĉu malgranda rulo, aŭ hazardludo, aŭ ilo kun tranĉa radeto por tranĉi (ekzemple) picon?

La kunteksto klarigas... Evidente la “Kuba Respubliko” ne akudas al ties formo, kaj “kuba metro” ne estas speciala mezuro uzata en Kubo!

Se estiĝas eventuala konfuzo, tio estas facile evitebla: ekde la komenco; infano forprenita disde la patrio; de post la tago kiam ili aperis sur la tero ĝis la nuna tago (*Biblio*: “Eliro” X:6).

Notu ankaŭ: *la traduko de Hamleto fare de Zamenhof* (rekomendita de la Akademio de Esperanto).¹

⁵ *Aktoj de la Akademio III (1975-1991)*. Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, – No 11. 1992. Sur p.73:

1. Post ita/ata/ota-vortoj, la aganto estas indikita per *DE*. Ekz-e, *ŝi estas*

amata de ĉiuj(6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).

2. Post o-vortoj *DE* povas indiki la aganton, se neniuj aliaj koncernatoj estas ebla. Ekz-e, *la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj* (Fundamento), *la parolado de la oratoro*, k.s.

3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas *FARE DE*. Ekz-e, *la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof*.

Oni cetere notu jenon: La voĉdonota teksto entenis jenan kvaran artikolon:


4. *La uzo de FAR en la sama funkcio estas ankaŭ akceptebla. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj far la urbestro.*

Sed dum la tri unuaj artikoloj estis akceptitaj de granda plimulto, la kvara ricevis nur unu voĉon super la tiama absoluta plimulto: neniuj do povas pretendi, ke la Akademio rifuzis la prepozicion *FAR*, des pli ke la artikolo 3 aludis aliajn formojn ol *FARE DE*.

Tamen la pozitive voĉdoninta Prezidanto decidis apliki la regulon de la 2/3 al tiu demando, kiel al lingva novaĵo (art. 23 de la Statuto); efektive li volis per tio eviti senfinajn diskutojn, ĉar pluraj forte deklaris sian oponon al oficialigo de *FAR*, pro tio ke estas tute nekutime retroderivi kaj krei prepozicion el “verba radiko” aŭ el kiu ajn alia radiko; aliaj dume kaj ne malpli forte subtenis la ideon, ke por tiu evidenta kaj escepta bezono la lingvo sukcesis krei al si oportunan kaj taŭgan rimedon el si mem, t.e. sen elekstera deprunto.

Aliparte la Direktoro de la Gramatika Sekcio kontestis, ke temas pri lingva novaĵo. □

EL PROVINCETOWN MASSACHUSETTS



DE SYLVAN ZAFT

Je ĉiu tago en la vid-sezon'
la ŝip' pleniĝas de turist-okuloj
kaj dum du horoj iras al la lok'
kie insuloj naĝas, plonĝas, ludas.

Ni homamasas jen je unu flank'
jen je l' alia. La eguloj diktas
"Tie staru homoj!" Fakul' klarigas
ke balenoj ŝatas ludi per la ŝip'.

Ni pagis por la sperto nur per mon'
Krucon ni ne fordonos. Ni penas gaje
kunsentante kun la estaĝegoj
kiujn Ahab serĉis por profit'.

Valoregajn ostojn aliaj celas.
La ĝojo de la monstroj estas nia!

RESPONDOJ POR NIA SPUR-KONKURSO



(Vidu *La Suda Kruco* Nov-Dec 1997,
p. 17)

- | | | |
|----|--|------------|
| 1 | | kastoro |
| 2 | | kato |
| 3 | | linkso |
| 4 | | histriko |
| 5 | | porko |
| 6 | | melo |
| 7 | | agutio |
| 8 | | ruĝa vulpo |
| 9 | | muso |
| 10 | | meleagro |
| 11 | | armadelo |
| 12 | | strathundo |

Nur unu leganto alsendis
respondon (eraran) por la
konkurso, sekve Odlo Bokserp la
duan fojon prenis la premion.
(Diamantan kolumon perore
ornamitan.) □

LA ESTONTECO DE ESPERANTO EN VIKTORIO

de FRANCISKA TOUBALE



Tiu temo arigis tridekon da Viktorianoj okaze de Simpozio la 25an de oktobro en la kutima renkontoloko de Melburna Esperanto Societo, Ross House. Laŭ la kvar ĉefaj rekomendoj de nia honora vizitanto Peter Ellyard, necesas:

- trovi famulojn, simpatiantojn, kiuj diskonigas la lingvon je diversaj kampoj, pere de Interreto, de muziko (se temas pri rokmuzikisto aŭ filmisto)
- instigi verkistojn pri sciencaj fantazioj uzi la lingvon en siaj verkoj, kiel jam faris Harry Harrison.
- organizi premion laŭ la modelo de Nobel-Premio, kiu kunigos la tutan mondon.

Alia propono estas trovi firmaojn, kiuj konsentas uzi Esperanton por siaj reklamoj, laŭ la spirito de TAKE⁵.

Simplaj agoj kiel: surporti insignojn, havi flugfoliojn por disdonado, meti gluetikedon sur la aŭtomobilon ne estu

forgesitaj.

Kadre de sia studado, Margarita Pavlova (studentino veninta antaŭ preskaŭ unu jaro el Sankta Peterburgo, Rusio) partoprenos gravajn kunvenojn pri edukado, lingvo kaj multkultureco en Brisbano, Balarto kaj Melburno. Ŝi intencas tiam atentigi la publikon pri Esperanto. Ŝi intencas ankaŭ plenumigi demandaron fare de la studentoj kaj analizi la respondojn. Ŝi taksas sian konon pri la esperantista kulturo ne sufiĉa por trafe respondi al demandoj. Marcel Leerveld organizos informkunvenojn kadre de la lunda kurso en Ross House. La nun aĉetebla kantlibro de Suzanne Holten, jam petita de ne-esperantistoj, eble allogos kant-ŝatantojn al la internacia lingvo. Grupeto kiu debatis pri homaj rajtoj, sub la gvido de John Coogans, kontaktos Esperantistojn en aliaj partoj de la mondo por akiri rektajn informojn pri la situacio tie.

Ni esperu ke post tiu diskuto sekvos fruktodona laboro. □



Margaret Inglis, Bernice Heinze, Haeng Cho, Stan Bruton kaj Myrna Attwood tradukas "Manifesto de Prago".

⁵ Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj — Red.



ODLO BOKSERP ANTAŬ

LA TRIBUNALO

PROCESO 147E/97 EN LA ANTARKTIKA TRIBUNALO DE LA INTERNACIA KORTUMO DE ĴURISTOJ

Antaŭ lia Moŝto
Juĝisto P. Dikventrulo

Juĝisto: Laŭ la oficiala akuzo donita al mi, la akuzito malice kaj plenkonscie ŝanĝis la tekston sur paĝo 2 de la pasintjara novembro-decembro numero de *La Suda Kruco*, celante konfuzi bibliotekistojn, perpleksigi abonantojn, kaj fraŭde senkreditigi la Esperantistan Mondan Unuiĝon de Brillantaj Interaktivaj Eldonejoj de Revuoj Oportunaj (EMU-BIERO). Kiel la akuzito respondas al tio?

Odlo Bokserp: Mi plene kulpas, Via Majesta Moŝto.

Akuzadvokato: Ĉu vi do agnoskas ke vi perfide nomis tiun numeron la Numero de Januaro-Februaro 1998, volumo 6, numero 1?

Juĝisto: Bonvolu ripeti. Mi ne aŭskultis.

Defendadvokato: Ĉu via Surde Absurda Moŝto ne rigardis la koncernan tekston en la koncerna

Revuo de la koncerna preskoboldo de la koncerna entrepreno de la koncerna koncerto de konvinkitaj konvertitoj de konvenaj konventoj kaj kunvenoj de kontemplaj konturistoj...

Akuzadvokato: Vi do diras ke via reprezentato estas turisto, kaj ne loĝanto de nia sen-trajta kaj sentrajta Lando de Neĝo kaj Glacio?

Juĝisto (al sia Asististo): Mia cerbo kirliĝas. Verŝu por mi glason da Ozono, mi petas.

Asististo (al la Juĝisto): La ozono jam depletiĝis, Moŝto.

Defendadvokato: Mi protestas, Via Mosto. Via asististo uzis fineologismon. "Depletiĝi" ne estas en *PIV*!

Asististo: Ĉu vi aŭdacas akuzi min pri neologismado, Advokataĉo? Rigardu la pleton: ĉu vi vidas glason da ozono sur ĝi?

Juĝisto: La pleto estas plene malplena!

Asististo: Do evidente la ozono jam tute de-plet-iĝis.



La ozono jam depletiĝis

Akuzadvokato: Li plene pravas, Moŝto.

Juĝisto: Pruvite! La Defend-

advokato devos punpagi 5 fiŝojn.

Defendadvokato: Mi ne povas, via Mosto. Ankaŭ miaj fiŝoj plene depletiĝis.

Odlo Bokserp (lekante siajn lipojn): Mmmm. Mi aŭ-dis tion.

Asististo (al Odlo): Iom da kremo, Sinjoro?

Odlo (Al la Asististo): Bonvolu.

Juĝisto: Diru, S-ro Akuzisto, kiom da aliaj kompostaĵoj tiu...tiu... — atendu momenton — (*rapide elverŝas glason da ozono kaj glutas ĝin*)... akuzito fuŝis.

Defendadvokato: 27, Moŝto.

Akuzadvokato (rigardas liston): Ĉu 27? Laŭ mia listo, nur 26.

Defendadvokato: Ĉu vi rimarkis la mankantan punkton en la indekso sur p.26?

Juĝisto (rigardas folion): Mi ne vidis tion.

Odlo: Ne eblas vidi mankantan punkton, Stultulo.


Defendadvokato: Parolu konvene. "Moŝta" Stultulo.

Akuzadvokato: "Eminenca Moŝta Stultulo", pli precize.

Juĝisto: "Majesta Eminenca Moŝta Stultulo," efektive.

Akuzadvokato (rigardas libron): PIV diras ke "eminenca" temas pri kardinalo.

Juĝisto: Mi havis kuzon kardinalan.



Odlo: Sendube vi do heredis la titolon.

Juĝisto: Sendube. Nu, kion vi diras pri tiuj 27 fuŝoj?

Odlo: Mi malvarmumis kaj tial mi ne povis fuŝi pli.


Juĝisto: Mi bone komprenas. Ĉiam mi glutas hipoglosoleon kiam mi malvarmumas.

Odlo: Ĉu tiuj fiŝoj estis hipoglosoj?

Juĝisto: Jes.

Odlo: Do verŝajne mi ne denove malvarmumiĝos.

Juĝisto: Mi esperas ke ne. Ĉu vi bone vidis tukon ĉirkaŭ vian kolon antaŭ ol marŝi tra la neĝo ĉi tien?



Odlo: Efektive, mi forgesis.

Akuzadvokato: Verdikton mi petas, Juĝisto.

Juĝisto: Verdikto, jes. Vi devos punlabori kvindek horojn da komunumservado en Aŭstralio, kaj poste direkti trajnojn en la Markola tunelo inter Britio kaj Francio.


Akuzadvokato: Dankon, Moŝto. Mi jam delonge volas labori en fervojtunelo. Kaj kion pri la akuzito?

Juĝisto: Nu, li glutu du aspirinojn se li denove sentos febron, kaj kuŝu kviete en la lito.

Odlo: Dankon Moŝto.

Defendadvokato: Ĉu restas iom de tiu ozonaĵo?

Juĝisto: Nepre. Bonvolu trinki. □



Geraldo Mattos (*ESK* 30 paĝe 19), pri la akuzativo ĉe tempindikoj, celas diri proksimume la samon kiel mi diris (kaj ni do samopinias), sed uzas malĝustan klarigon. “Dimanĉo” kaj “monato” ambaŭ povas konsiderati aŭ kiel punkto en la tempo aŭ kiel daŭro (mezuro) de tempo. Komparu ekz. “Dimanĉon mi foriros” kaj “Dimanĉo da laboro por mi malplias ol semajntago da laboro”, kaj “La monaton Julio mi foriros” kaj “(Unu) Monato da laboro ne sufiĉas”.

Ne estas vere ke “la tutan monaton” estas ĝusta (kaj ne “la monaton”) pro tio ke la vorto “tuta” estas tempindiko, ĉar 1^a. ankaŭ nemezurindikaj adjektivoj havas la saman efikon: “Ili foriros proksiman monaton” kaj “Ili foriris jam la unuan tagon”; kaj 2^a. krom “la tutan dimanĉon” oni tamen povas diri “Labori [dum] du dimanĉojn ne sufiĉas”; kaj 3^a. “dimanĉo” ne estas pli nek malpli mezurindikpova ol “monato”, kaj ambaŭ povas uzati kiel punktoj en la tempo: “Mi ferios [en] la duan monaton de la jaro”. Do la kialo de la malsama uzo ĉe “labori dimanĉon” kaj “labori dum

la nokto” (anstataŭ “la nokton”) estas alia, nome ke ni (mallogike) konsideras ĝenerale, = unuavide, la vortojn dimanĉo ktp kiel punkton en la tempo (do nemezuritan), dum la vortojn nokto ktp unuavide kiel parton de la tempo (do mezuritan). La malsama traktado ne estas pro lingva motivo, sed pro nia (ne-logika?) penskutimo. Cetere “tuta” uziĝas por substreki ke temas pri “dum” = je la tuta daŭro de”, ne pri “dum” = “je parto de la daŭro”.

Ankaŭ pri la dua de mia kvarpunkta refuto ni evidente samopinias baze, ĉikaze pri la ebleco uzi prepozicion kiel prefikson ĉe n-transitivaj verboj, kiuj tiel fariĝas (ŝajn)transitivaj (loĝi en lando → enloĝi landon), escepte ke mi ne faras al tiu regulo esceptojn por du prepozicioj. Ĉar mi antaŭe ne kredis ke G.M. farus regulon kun esceptoj, mi normale deduktis ke li malpermesemas ĉiajn tiajn kazojn. Kaj mi tute ne kritikis la Zamenhof’an kutimon uzi la pli analizajn formojn, kiuj ja estas same Fundament’ecaj kiel la aliaj. El tiuj aliaj G.M. prenis du ekzemplojn por montri ke ili ne ĝenerale estas uzataj. Nu, unu el la du efektive ne estas (ne bezonas esti): “Li devenis noblan familion”. Tamen se mi unuafoje renkontas tiun esprimon, mi (kaj mi supozas ĉiuj) tuj komprenas la signifon kiel “Li devenis de nobla familio”, neniam kiel “Li devenis al nobla familio”. Kaj mi plu asertas ke la dua ekzemplo, “Li rapide eliris la domon” (por el la domo, *ne* al en la domo) estas ĝenerale uzata. □



EL LA REGIONOJ

Qld: La 17-an ĝis la 19-a de oktobro, Esperanto-Federacio de Kvinlando okazigis semajnfinan konferencon en kaj apud Toowoomba. Tiu urbo, situanta sur la montara kresto 130 kilometrojn okcidente de Brisbano, jam de longe estas centro de aktivado pri Esperanto. Tie ankaŭ troviĝas Universitato de Suda Kvinlando.

La semajnfina renkontiĝo komenciĝis en la universitato. Post lunĉo, kies gastiganto estis la rektoro, prelegis en publika kunveno Profesoro Alan Bishop el Melburno. En sprita maniero, kaj helpe de ŝerc-desegnaĵoj sur diapozitivoj, li priparolis la esplorprogramon EKPAROLI kaj respondis al demandoj.

La Esperantistoj poste ĝuis la trankvilon de la Japana ĝardeno apud la universitato, antaŭ ol veturi malsupren por ekloĝi en kabanoj ĉe kampara feriejo proksime de Withcott. Tie sekvis du tagnoktoj da kunvenoj kaj da manĝado, muziko, konversacio, manĝado, promenado, naĝado, manĝado, kaj aliaj distroj. fine, en la dimanĉa posttagmezo, kelkaj el la partoprenantoj veturis al Ipswich, kie Alan Bishop refoje

prelegis al malgranda aŭdantaro en la gimnazio por knabinoj.

Post ĝuiga kaj stimula semajnfino, la 15 konferencintoj ne povis ne esperi ke baldaŭ venos la sekva tia okazo.

Raportis Ron Gates

Skolta Ĵamboreo ĉe Springfield, 2-11an de januaro. En la Esperanto-tendo okazos elmontraĵo de Esperanto.

Somerlernejo de AEA en Ipswich, 11-24an de januaro.

Ĝenerala AEA-Jarkunveno merkredon, la 21an de januaro, dum la Somerlernejo.

EFK-Konferenco, la 27-29an de martò, ĉe Mt Tamborine.

Laŭ La Voĉo.

SA: ADELAJDO: La Sudaŭstralia Esperanto-Societo kunvenos lunde la 12an kaj 26an de januaro, kaj post tiam ĝis majo la 1an, 2an, kaj 4an lundojn de ĉiu monato; ekde majo, ĉiulunde. La kunvenejo estas la Kvaker-Domo.

La decembra numero de *Tamen Plu* listigas naŭ Esperanto-grupojn kunvenantajn en naŭ lokoj, unu grupo kunvenas lunde, du grupoj marde, tri grupoj kunvenas merkrede, kaj aliaj tri grupoj ĵaŭde. Unu el la ĵaŭdaj kunvenoj estas "social night" en la Kafejo Fleet Street.

[Informoj laŭ Tamen Plu]

WA: PERTO: Estis por ni granda plezuro bonvenigi du novajn anojn, S-ino Ilsa Erber, kiu venis de Sidnejo, kaj Alan Mendelawitz, kiu estas malnova studanto de Shirley Gradussov.

La 11an de oktobro 1997 ni pro-

pagandis Esperanton en la Kultura Centro apud la Art-Muzeo kaj la Ŝtatbiblioteko.

[*Laŭ La Nigra Cigno* nov. 1997] □


NOVA HONORO POR IDYSS



La Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj nomumis Idyss Einhovici honora membro. Ni gratulas al Idyss, nun 94-jara.

[*Laŭ Interredaktore*] □

ESPERANTAJ MALLONGIGOJ



En la Esperanta gazetaro oni ofte renkontas mallongigojn. Ĉi-foje ni listigas kelkajn ofte renkontatajn el ili.

AdE — Akademio de Esperanto

bk — bildkarto

CED — Centro de Esploro kaj

Dokumentado pri la monda lingvo-problemo

CD-ROM — codoromo, komputila laserdisko

CO — Centra Oficejo

ĉ. — ĉirkaŭ

D — delegito de UEA

dez. — deziras, dezirantoj

Eve — Eventoj

FD — fakdelegito de UEA

HdE — *Heroldo de Esperanto*

i.a. — inter aliaj

IEM — Internacia Esperanto-Muzeo

IJF — Internacia Junulara Festivalo (granda printempa junulara aranĝo en Italio)

IJK — Internacia Junulara Kongreso de TEJO

IJS — Internacia Junulara Semajno (granda somera junulara aranĝo en Hungario)

IKUE — Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

IL — Internacia Lingvo

ILEI — Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj

IM — individua membro de UEA

IRK — internacia respondkupono (perpoŝta pagilo)

IS — Internacia Seminario (granda jarfina junulara aranĝo en Germanio)

JD — junulara delegito de UEA

k — kaj

k.s. — kaj similaj

KCE — Kultura Centro Esperantista (en Svisio)

KD — kompakt-disko


KELI — Kristana Esperantista Ligo Internacia

KKS — konstanta kongresa sekre-

tario
kor. dez. — korespondi deziras
KSM — Koresponda Servo Mondskala
LA — Landa Asocio (ekz. en UEA)
LF-Koop — Kooperativo de *Literatura Foiro*
LKK — loka kongresa komitato
L.S. — LINGVO-Studio [eldonanto de *Eventoj*]
LS — Landa Sekcio (ekz. en TEJO)
MA — membro-abonanto, individua membro de UEA kun abono al *Esperanto*
MG — individua membro de UEA kun la *Gvidlibro*
MJ — individua membro de UEA kun la *Jarlibro*
ndlr — noto de la redaktoro
OB — Oblikva baletistino (kuzino amata de Odlo Bokserp)¹
OK — Organiza komitato
p. — paĝo
p/a — poŝtadrese (ĉe la adreso de iu, c/o)
PAG — *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*
PIV — *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*
PK — Plenumkomitato [de SAT]
PMEG — *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (en Interreto)
PS — *Pasporta Servo*
red. — (la) redaktoro
s-ano — samideano
s-ro — sinjoro
SAT — Sennacieca Asocio Tutmonda

sce — Esperanta novaĵgrupo en interreto; soc.culture.esperanto
sk — sendokostoj
TAKE — Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj
t.e. — tio estas
UK — Universala Kongreso de Esperanto
VD — vicdelegito de UEA
Z — Zamenhof
ZEO — Zamenhofa aŭ Esperanta Objekto

[Adaptita el listo en *Eventoj*] □



La redaktoro de *tejo tutmonde*, unu el niaj plej altestimataj gazetoj, konigis la novan helpredaktoron de tiu gazeto, en la oktobro-decembra numero.

Pri ŝia foto li komentis: “Ŝi ŝatus saluti vin sed bedaŭrinde ŝi estas tro laca post tiom da laboro!”¹

Ŝiajn piedsignojn ŝi forgesis lasi sur nia paĝo 18. Jen ili:



¹ Ankaŭ mi! — Odlo. □

LASTATEMPAJ KURIOZAJ INFORMOJ PRI ESPERANTO



Informoj sub la vorto Esperanto en la informejo de Reuters: EU Briefing (okt. 97)

- Independent (UK) 25/10/97 p. 25: **Languageforce to introduce the world's first "universal translator" at comdex.**

Orange, Calif. (Business Wire) – Oct 16, 1997 – The Universal Translator, a Windows95-based software program that allows users to instantaneously translate into 25 languages will be introduced at the upcoming Comdex/Fall 1997.

La programo haveblas ĉe LanguageForce, 2860 N. Santiago, No. 210, Orange, CA 92867, Fax. 714/279-9368, <http://www.wforce.com>.

Noto: Esperanto estas unu el la 25 lingvoj.

- Telegraph Group Ltd, London, 1997 — UK — 31/10/97: **Bush telegraph — on brand names**

Grand Metropolitan and Guinness have dropped the name GMG Brands. "Identity consultants" have proposed the new name "DIAGEO" for the group. The Esperanto-esque

word will, it is claimed, better complement the company's global interests. There has long been a search for the ideal brand name that will travel across borders.

- Granda kolekto de surretaj lingvovortaroj kun vortolistoj, ankaŭ en Esperanto, troveblas sur: <http://www.bucknell.edu/rbeard/diction2.html>

- Aliaj lingvorilataj TTT-ejoj. Jen ili:

<http://www.kli.org>

<http://www.travlang.com/languages/>

<http://www.newsling.org/menu.html>: giganta kolekto de taggazetoj surretaj kaj ligoj al 3624 surretaj publikaĵoj katalogitaj laŭlande kaj laŭlingve

<http://www.timecast.com>: por aŭskulti lokan radion, jen katalogo de surretaj RealAudio (radio) kaj vidbendoprogramoj

<http://www.notam.uio.no/hcholm/alltlang/stat.html>: alternativa vortaro de 120 lingvoj de kiuj nur 79 enhavas vortojn. Se via mankas plenigu la vortaron per kelkaj frazoj

<http://www.logos.it/>: rapida vojo por trovi la signifon de nur unu fremdvorto. Entajpu la vorton kaj Logos trovos por vi la respondon en 19 lingvoj.

- Se fine vi volas praktiki lingvojn (babiladi) iru al rivendel.com/ric/resources/langchat.html

[El Interredaktore] □

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2014.

Sekretario: Alan Turvey, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 09-270 3669

Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ kaj faksoj: 09-579 4767.

e-poŝto: Bradley McDonald
<neelam@voya ger. co.nz>

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

AŬD \$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al Libro-servo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libro-servo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$30. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 60 Ned. Gld., pagu al la konto aeal-w de la Libro-servo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1998 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1998 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de ESK estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per Power Macintosh 7200/90, la programo uzita estas Nisus Writer. Alfabetoj uzitaj estas New Century Schoolbook 10 kaj Franklin Century 16.